6-a Jaro. N-o 276 APERAS SEMAJNE Leipzig, 16./1. 1930



ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

KULTURA KAJ INTERHELPA ORGANIZO DE PROLET-ESPERANTISTOJ

REDAKTEJO: 14, avenue de Corbéra, Paris-12e
Gvidanto: E. Lanti

SIDEJO de Plenum-Komitato de SAT
23, rue Boyer, Paris-20e

ADMINISTREJO: Kolmstr. 1, Leipzig O 27
Administranto: R. Lerhner

KULTURO EN SUDAMERIKO

La vaporŝipo alvenis en la haveno de Montevideo (Urugvajo) kaj proksimume 20 personoj forlasis tiun lokon, sur kiu ili dum kelkaj semajnoj pasigis senzorgan vivon. Ĉeborde ili trovis fremdajn homojn, fremdajn kutimojn; neniun konante ili vagadis ĉirkaŭ la haveno kaj pensis, kie ili povos dormi, kie labori? Ilian pensadon interrompis hungara voĉo, kaj ili ĝoje rigardis tiun personon, kiu ilin alparolis en ilia nacia lingvo. Tiu homo estis agento de la hotelo "Eŭropo". La elmigrintoj ekĝojis sciiĝante, ke tiu ĉi ulo helpos al ili, kaj unue ili demandis pri dormloko. La agento tuj vokis ilin en la hotelon, dirante, ke tie oni ricevas tranoktejon kaj manĝaĵon por 1 peso (= 1 dolaro) tage, kaj ke oni tie trovos agenton, kiu dum mallonga tempo havigos al ĉiuj laboron. La fremduloj ĝoje akceptis la proponon de l' agento dirante, ke ili ankaŭ havas pakaĵojn. La agento fajfis kaj ekaperis ŝarĝaŭtomobilo kun kondukisto samnacia. La fremduloj ekokupis la aŭtomobilon kaj ili atingis post 20 minutoj la hotelon. Sed tie komenciĝis la surprizo.

La kondukisto petis po persono kaj po pakaĵo 1 peson, kiun sumon la elmigrintoj malĝoje — tamen pagis. Oni kondukis ilin al la unua etaĝo, kie ili ricevis 5 ĉambrojn, en ĉiu ĉambro 4 litoj. La fremduloj vivis tie 2 semajnojn kaj spertis multon, ankaŭ tion, ke ili ne estis en "ora Ameriko". Ili klopodis trovi agenton, kiu serĉos laboron por ili. Por la enskribiĝo ili devis pagi al tiu agento ĉiu unu peson, kaj post laborricevo ili laŭ grandeco de l' salajro devos denove pagi 1—2 pesojn.

Serĉante laboron

Dum la dusemajna periodo nur 3 personoj ricevis laboron, la aliaj silentis kaj pagis sian peson ĉiutage atendante la feliĉan ŝancon, kiam ankaŭ ili ricevos laboron. Post kelkaj tagoj kvar el ili estis dungataj por kamplaboro. Ilin forportis la aŭtomobilo de bienposedanto 300 kilometrojn for de la urbo. Alveninte la bienon ili ricevis kiel ejon por loĝi kaj dormi domaĉon el tero sen lito nek tablo. Mankis eĉ pajlo por nokte surkuŝi. La sekvantan tagon oni forportis ilin por fosi la ĝardenon de l' bieno. La manĝaĵo konsistis ĉiam el viando kaj duonseka pano. Nokte ili ne povis dormi pro amaso da kuloj. La akvo estis malsaniga por trinkado; dum kelkaj tagoj preskaŭ ĉiuj havis stomakdolorojn. Same vivaĉis tie ankaŭ la indiĝenoj, kiuj ne konas ion alian ol ĉevalon, sur kiu ili rajdas, la ŝafaron, kiun ili gardas kaj la viandon, kiun ili manĝas. Virinon ili vidas nur, kiam ili eniras la urbon, ĉar ĉi tie virinoj estas tre maloftaj.

En tiu loko la elmigrintoj vivaĉis dum monato; fine ili decidis forlasi la laborlokon kaj petis la posedanton, ke li pagu al ili la salajron. Sed la mastro, kiu ĉiam loĝas en la urbo, ridante forpelis ilin. Kion fari? Al kiu iri por plendi? Eĉ ne la nomon de l' posedanto ili sciis. Ili komencis piedvagadi sur la nekonata vojo, kaj post dek tagoj, ĉifonvestitaj, vendinte ĉiun havaĵon ili revenis al la urbo kaj tie perdiĝis inter la samsortanoj. Ĉiuj estis metiistoj.

Malbonaj spertoj

En la hotelo estis ankaŭ iuj geedzoj, kiuj same ricevis laboron en la kamparo. Ankaŭ ilin la posedanto forkondukis per sia aŭtomobilo dirante, ke la bieno estas apud urbeto *Minas*, kiu malproksimas 120 km. de Montevideo. Kiam la aŭtomobilo atingis Minas, ili rimarkis, ke ili forlasas la urbon, ne haltas, kaj senparole, sed scivole ili atendis sian estontan sorton. Dum 1½ horoj ili trapasis inter krutaj montoj, nenie kulturo, nur ŝtonmontoj, la vojo tiom malbona, ke la elmigrintoj konstante atendis renversiĝon aŭ marmalsanon. Fine en iu valo kuŝis la celita bieno. Estis marmorminejo.

Tie ili trovis bulgaran elmigrinton, kun kiu ili povis interkompreniĝi rumane. Li diris, ke la viro devas labori en la legomĝardeno, la virino kiel kuiristino. Post du semajnoj la edzino rimarkis, ke la loko por ŝi ne estas taŭga, ĉar la labormajstro de l' minejo ne lasis al ŝi pacon. Ili decidis foriri, sed la direktoro promesis, ke tia afero ne plu daŭros. Senmone ili do restis tie kaj eksciis multajn novaĵojn. Ili aŭdis, ke, se iu malsaniĝas, li ŝuldas al la doktoro *150* pesojn, por ke li venu aŭtomobile el Minas. La laboristoj akiris monate 30—35 pesojn krom la nutraĵo. En la minejo regis tute arbitra ordonado de l' majstro kaj sub-estro. Tiu lasta ne laborigis siajn laboristojn iun tagon por puni ilin pro ia nedisciplina ago. Al plendo de l' laboristoj la posedanto respondis, ke la laborgvidisto rajtas puni, se ili ne obeas donitajn ordonojn. 4 bulgaroj post tio forlasis la lokon.

Direktoro, majstro kaj submajstro estis italoj, dum la aliaj krom kelkaj bulgaroj estis enlandanoj. Tagon post tago ili manĝis ĉiam panon kaj viandon, kiun ili mem kuiris. Ĉiun manĝaĵon alportis privata aŭtomobilo

JANUARAJ MEMORDATOJ

Lenin — Libkneĥt — Luksemburg. Tri nomoj — tri batalantoj, kiujn rabis la morto for de la batalkampo en januaro. Murdis ilin la klasa malamiko! Nur al Lenin estis permesite batali en venkaj kondiĉoj . . . la du aliaj estis dispremataj de la Fera Kalkanumo kune kun miloj da Berlinaj gelaboristoj.

Kiom la venko, la verko de Lenin impresis la tutan mondon, kiom lia nomo penetris trans la limojn de Sovetio en ĉiulandajn laborulajn tavolojn, pri tio atestas la sekvanta malgranda priskribo pri la "kalamkaro".

Kaj por memori la agadon de la kunule batalintaj kaj mortintaj germaniaj revoluciuloj, ni sekvigas fragmenton el la "Junius"-broŝuro de Roza Luksemburg, liniojn verkitajn dum la granda milito, kiam la proletaj amasoj deturniĝis de la klasbatalo kaj obeante la ordonojn de l' militestroj forbrulis en la flamoj de l' mondfajrego.

LA KALAMKARO

La kalamkaro estas persa kolorita kaj pentrita peco da ordinara kotonŝtofo. La kalamkaroj estas disvastigataj en tuta Persio. Ĉi tiu objekto estas necesa en persa hejma mastrumado. Kalamkaro estas uzata kiel tablotuko, litkovrilo, kurteno por fenestroj kaj pordoj, kiel murornamaĵo kaj pakaĵvalizo, en kiun perso nodligas siajn objektojn dum vojaĝo.

Dank' al speciala konsisto de farboj. la kalamkaro ne perdas sian koloron sub sunagado kaj ne perdas sian belon post lavado. Plej kvalifikitaj pentristoj-kreistoj de la kalamkaroj estas koncentritaj en la urbo Isfahan. Ĉi tiu urbo estas la urbo de metiistoj, laboruloj, laborkantistoj.

La metiejoj de la kalamkaristoj ordinare trovas rifuĝon en senaeraj, mallarĝaj, kovr-arkaĵaj duonmallumaj bazarstratoj, en iliaj sufokaj niĉoj. De kiam la persaj metiistoj eksciis pri lando de Sovetoj, plej ŝatata temo de Isfahanaj kalamkaristoj estis "la lando de Lenin". En Persio la laboro estas malfeliĉo; la laboruloj ne estas estimataj; oni ilin egaligas al laborbrutaro. "La landon de Lenin" ili povas imagi al si nur sur kalamkaroj — tiel fabela ĝi estas, tiel diferenca kompare kun la severa persa efektivo.

Sur diversaj kalamkaroj aperas tuta serio da portretoj de Lenin, K. Marks, blazonoj de USSR, de Soveta Armenio,



Kalamkaro kun portreto de Lenin

kiu estas plej apuda parto de USSR al Persio — ktp. Sed Isfahan estas la plej reakciema urbo en Persio. La administracio, timigita pro la kalamkaroj kun sovetaj bildmotivoj, traserĉis en 1928 la kalamkaristojn de Isfahan kaj malpermesis al ili la produktadon de tiaj al la persa kapitalista ŝtatordo detruemaj kalamkaroj. De ĉi tiu tempo ili estas sovetaj maloftaĵoj, akaparataj de britaj komerc-agentoj.

Sed la persaj administrantoj forgesis, ke, se al persaj laboruloj la figurigo de malpermesitaj fruktoj estas dolĉa, plej dolĉa al ili estas la frukto en naturo!

P. Širjaev (5299).

---

el la urbo Minas. La aŭtomobilo ankaŭ transportis la leterojn, kaj oni devis krompagi por ilin ricevi 0,05 peson po peco. La ĝardenisto kaj la kuiristino observis, ke la situacio ĉiam pli malboniĝis. Ili povis interkompreniĝi nur kun la restinta bulgaro. La enlandanoj tre malamis la elmigrintojn. La majstro ĉiam spionis la geedzojn, kontrolis, kun kiu ili parolas, ĉu nokte ili estas hejme aŭ ne. Kiam la posedantoj kaj la direktoro revenis el la urbo, ili ankaŭ deziris posedi la korpon de l' virino. Fine ili ne plu eltenis, forlasis tiun malbonan laborlokon kaj reiris kiel la aliaj al Montevideo . . . *Ludoviko Staub* (Montevideo).

EL "ŜTATO KAJ REVOLUCIO" DE LENIN[1]

. . . Nur en la komunisma socio, kiam la kontraŭstaro de kapitalistoj estos jam definitive rompita, kiam ne ekzistos klasoj (t. e. ne ekzistos diferenco inter socianoj laŭ ilia rilato al la sociaj rimedoj de produktado), nur tiam "malaperos la ŝtato, kaj *estos eble paroli pri libereco*". Nur tiam estos ebla kaj estos efektivigita la demokratio efektive plena, efektive sen ajnaj esceptoj. Kaj nur tiam la demokratio, komencos *formortadi* pro tiu simpla cirkonstanco, ke, estante senigitaj je kapitalisma sklaveco, je sennombraj teruraĵoj, sovaĝaĵoj, sensencaĵoj, malnoblaĵoj de kapitalisma ekspluatado, la homoj prograde *kutimos* sekvi la elementajn, dum jarcentoj konatajn, dum jarmiloj ripetatajn en ĉiuj skriblerniloj, regulojn pri kunvivado, sekvi ilin sen perforto, sen devigado, *sen aparta aparato* por devigado, kiu nomiĝas ŝtato.

La esprimo "la ŝtato formortos" estas elektita tre trafe, ĉar ĝi montras kaj la laŭgradecon de l' procedo kaj la spontanecon de ĝi. Nur kutimo povos fari kaj sendube faros tian efikon, ĉar ni ĉirkaŭ ni observas milionfoje, kiel facile kutimas homoj sekvi la necesajn por ili regulojn pri kunvivado, se ne ekzistas ekspluatado, se ne ekzistas io, kio ribeligas, elvokas proteston kaj ribelon, kreas neceson de *subpremo.*

Do, en la kapitalisma socio ni havas demokration ĉirkaŭtranĉitan, mizeran, falsan, demokration nur por riĉuloj, por la malplimulto. La diktatoreco de l' proletaro, periodo de transiro al komunismo, unuafoje donos demokration al la popolo, al la plimulto, paralele kun la necesa subpremado kontraŭ la malplimulto, kontraŭ la ekspluatantaro. Sole la komunismo kapablas doni demokration plenan, kaj ju pli plena ĝi estos, des pli ĝi fariĝos malnecesa; ĝi formortos per si mem.

Alivorte: dum la kapitalismo ni havas ŝtaton en la propra senco de l' vorto, la apartan maŝinon por subpremado de unu klaso flanke de la alia kaj krome de la plimulto flanke de la malplimulto. Estas kompreneble, ke por la sukceso de tia ago, kiel sistema subpremado de l' malplimulto eksplu atanta kontraŭ la plimulto ekspluatata, estas necesa la ekstrema kruelo, besteco en subpremado, estas necesaj maroj da sango, trans kiuj la homaro faras sian vojon en la stato de sklaveco, servuteco, dungeco . . .

Tradukis *G. Demidjuk.*

[1] SAT-eldono. 150 paĝoj. Prezo: 1 mk. g. R. Lerchner, Colmstr. 1, Leipzig O. 27.

EL "JUNIUS"-BROŜURO[1]

. . . La imperialista politiko ne estas la verko de unu aŭ de kelkaj ŝtatoj, ĝi estas la produkto de la maturgrado en la mondevoluo de l' Kapitalo, fenomeno deorigine internacia, nedividebla tuto, kiu estas ekkonebla nur en siaj reciprokaj rilatoj, kaj de kiu neniu ŝtato povas liberigi sin.

Nur de tiu bazo la demando pri la "nacia defendo" en la hodiaŭa milito povas esti ĝuste taksata. La nacia ŝtato, nacia unueco kaj sendependeco, estis la ideologia reklamŝildo, sub kiun la burĝaj grandŝtatoj en Centra Eŭropo dum la pasinta jarcento stariĝis. La kapitalismo ne povas harmonii kun

[1] Legante tiujn liniojn ne forgesu, ke ili aperis en 1915. — Red.

la etŝtata principo, kun ekonomia kaj politika izoliĝo; ĝi bezonas por sia disvolvo kiel eble plej grandan, interne unuecan teritorion kaj spiritan kulturon, sen kiu nek la bezonoj de l' socio povas esti altigataj sur la nivelon konforman al la kapitalista varproduktado, nek povas funkcii la mekanismo de l' moderna burĝa klasregado. Antaŭ ol la kapitalismo povis elkreski ĝis la tutan teron ampleksanta mondekonomio, ĝi provis krei al si en la naciaj limoj de ŝtato unuecan teritorion. Tiu ĉi programo estas — ĉar ĝi povis esti realigata sur la ŝaktabulo politika kaj nacia transdonita de la feŭda mezepoko, nur per revolucia vojo — efektivigita en Francio sole, en la granda Revolucio. En cetera Eŭropo ĝi iĝis fragmento, kiel entute la burĝa revolucio haltis sur duona vojo. La Germana Regno kaj la hodiaŭa Italio, la daŭrado de Aŭstrio-Hungario kaj de la Brita Imperio por tio estas vivaj pruvoj. La nacia programo ludis historian rolon nur kiel la ideologia esprimo de la prosperanta, potencon en la ŝtato celanta burĝaro, ĝis la burĝa klasregado kreis al si en la grandŝtatoj de Centra Eŭropo, en ili pli malpli bone konstruite, la bezonajn instrumentojn kaj kondiĉojn.

De tiam la imperialismo tute entombigis la malnovan burĝ-demokratan progreson, deklarante kiel programon de l' burĝaro en ĉiuj landoj la ekspansion trans naciajn limojn kaj sen konsidero je naciaj kompleksoj. La nacia frazo certe restis. Sed ĝia reala enhavo, ĝia funkcio transturniĝis en sian malon: ĝi funkcias nur ankoraŭ kiel mizera maskigo de imperialistaj celadoj kaj kiel batalkrio de imperialistaj konkuradoj, kiel sola kaj lasta ideologia rimedo, per kiu la popolamasoj povas esti kaptataj por sia rolo de kanon-nutraĵo en la imperialistaj militoj.

La ĝenerala tendenco de l' nuna kapitalista politiko regas en tio kvazaŭ superpovega blinde estranta leĝo la politikon de l' unuopaj ŝtatoj, kiel la leĝoj de l' ekonomia konkurado ordone difinas la produktad-kondiĉojn de l' unuopa entreprenisto.

Se ni momenton supozas — por kontroli la fantomon de l' "nacia milito", kiu hodiaŭ regas la socialdemokratan politikon — ke en unu el la hodiaŭaj ŝtatoj la milito ĉe sia elirpunkto efektive komenciĝis kiel vera nacia defendmilito —, antaŭ ĉio milita sukceso kondukas al okupo de fremdaj teritorioj. Ĉar ekzistas dume treege influhavaj kapitalistaj grupoj, kiuj havas intereson je imperialistaj konkeroj, dum per la milito mem estas vekataj apetitoj je ekspansio, la imperialista tendenco, kiu komence de l' milito ekzistis nur embrie aŭ dormadis, ekkreskegos dum la paso de l' milito kiel en atmosfero de planta varmejo kaj difinos la karakteron de l' milito, ĝiajn celojn kaj rezultojn. Plie: la sistemo de l' aliancoj inter la militarist-ŝtatoj, kiu regas depost jarcentoj super la politikaj rilatoj de l' ŝtatoj, kaŭzas, ke ĉiu el la militantaj partioj dum la milit-okazado ankaŭ provas tiri al sia flanko pro puraj defend interesoj kunliganojn. Per tio ĉiam pli da landoj estas militpartoprenigataj kaj tiel neeviteble imperialistaj aferoj de l' mondpolitiko tuŝataj kaj novaj kreataj. Tiel unuflanke Britio entiris Japanion, transkondukis la militon el Eŭropo al Orientazio kaj surtagordigis la sortojn de Ĉinio, ekscitis la konkuremon inter Japanio kaj Usono, inter Britio kaj Japanio, do amasigis novan ŝtofon por estontaj konfliktoj. Tiel aliflanke Germanio trenis en la militon Turkion, per kio estis metata senpere por likvido la demando de Konstantinopolo, de l' tuta Balkano kaj de Malgrand-Azio . . .

. . . Tiel la difino mem pri tiu modesta, virta, patriota defendmilito, kiu hodiaŭ estas en imago de niaj parlamentanoj kaj redaktoroj, estas pura fikcio, kiu evidentigas la mankon de ĉiu historia kompreno pri la tuto kaj pri ĝiaj mond-interdependoj. Pri la karaktero de l' milito ja ne decidas la solenaj deklaroj kaj ne eĉ la honestaj intencoj de t. n. gvidantaj politikistoj, sed la laŭcirkonstanca historia kondiĉaro de l' socio kaj de ĝiaj militistaj organizoj.

La skemo de l' pura "nacia defendmilito" unuavide povus konveni eble por lando kiel Svisio. Sed Svisio ĝuste ne estas nacia ŝtato kaj krome ne tipo por la hodiaŭaj ŝtatoj. Ĝuste ĝia "neŭtrala" ekzistado kaj ĝia lukso je milicio mem estas nur negativa frukto de l' latenta militostato de la ĝin ĉirkaŭantaj grandaj militarist-ŝtatoj kaj ankaŭ nur tiel longe tenebla, kiel ĝi povas akordiĝi kun tia stato. Kiel tia neŭtraleco en mondmilito tuj estas dispremegata de l' soldatbotego de la imperialismo, montras la sorto de Belgio. Ĉi tie ni venas speciale al la situacio de l' malgrandaj ŝtatoj. Vere klasikan pruvon por ekzemplo de l' "nacia milito" liveras hodiaŭ Serbio. Se iu ŝtato laŭ ĉiuj eksteraj formalaj signoj havas je sia flanko la rajton je nacia defendo, do estas Serbio. Kaŭze de la aneksoj fare de Aŭstrio prirabita de l' nacia unueco, minacita de Aŭstrio en sia nacia konsisto, devigita de Aŭstrio militi, Serbio batalas laŭ ĉiu homa konsidero la veran defendmiliton pro ekzisto, libero kaj kulturo de sia nacio. Se la germana frakcio[1] en sia pozicio pravas, tiam la serbaj socialdemokratoj, kiuj protestis en la Belgrada parlamento kontraŭ la milito kaj rifuzis la militkreditojn, estas vere perfiduloj je la vivinteresoj de l' propra lando. Fakte la serboj Lapŝeviĉ kaj Kazleroviĉ ne nur enskribis sin per oraj literoj en la historio de l' internacia socialismo, sed samtempe montris akran historian vidon por la veraj interdependoj de l' milito, per kio ili faris al sia lando, al la klerigo de sia popolo la plej bonan servon . . .

R. Luksemburg

[1] Temas pri la socialista frakcio en parlamento. — Trad.



PRI KRISTNASKO

Nun, kiam estas forpasinta la ĉiujara ĉefa tago por festenoj, donacoj, drinkadoj k ĉiaj diboĉoj, mi skribu kelkajn vortojn pri Kristnasko.

Oni ofte aŭdas jenon: Jesuo Kristo estis vera socialisto, saĝa homo, tial li estis turmentata. Eĉ okazis, ke "kleruloj" verkis librojn por — multfakte k tute "precize" — klarigi la vivon de la "filo de dio".

Ŝajnas, ke el ni malmultaj scias, ke Jesuo estas mito, ke li neniam ekzistis. Ĉiutempe k ĉiulande en la antikveco (pra- k historiaj tempoj) la popoloj adoris la naturajn fortojn, sed precipe la sunon. La dio de la egiptoj estis Osiriso, t. e. la suno, k la 12 zodiaksignoj estis elpensataj por montri la 12 monatojn de la jaro. Poste la grekoj "homigis" la dion nomante ĝin Herkuleso k la 12 "laboroj de Herkuleso" same montras la 12 monatojn de la jaro. Pli poste anareto da friponoj elpensis novan religion aliigante la ĝis nun konatan k sian dion nomis Jesuo: sed la 12 apostoloj de Jesuo ankaŭ montras la 12 monatojn de la jaro.

La neneigebla pruvo, kiel *Jesuo* signifas *sunon* estas la fakto, ke Jesuo naskiĝis la 25-an de decembro, t. e. ĝuste en la tago, kiam la Tero komencas ĉiujare alproksimiĝi al la Suno! Cetere per sia surkapa senhara rondaĵo la kristanaj pastroj montras la sunbildon.

Kiam la kristanoj adoras Kriston, ili ne scias, ke ili adoras la sunon! Fakto plene montranta la mitecon de Jesuo kuŝas en tio, ke estas neeble legi eĉ unu vorton devenantan de li. Estas ja memkompreneble, ke tia "kvazaŭsuperhomo", se li estus ekzistinta, scius skribi k skribus — kiel ĝin faris multe da famuloj vivintaj pli antaŭe ol la legende aludita Kristo. Tamen, se Jesuo estas mito, Suno estas fakto, k sen tiu "varmigilo" estus nenia viva estaĵo sur la Tero. Tial ŝajnas al mi, ke ne estus stulto, se ni "festus" la tagon, en kiu ĉiujare Tero ekalproksimiĝas al Suno. Oni nomus tiun tagon — la 25-an de decembro — *Sunfesto*. Laŭ mia opinio, tio estus trafa kontraŭreligia bato.

Niaj sovetiaj K-doj pripensu, ĉu ili ne povus iniciati la sunfeston!

S-ano 55.

SENNACIULA LIBERPENSULA PAĜO

N-o 12 REDAKTAS LIBERPENSULA SEKCIO DE SAT N-o 12

Manuskriptojn sendu al: KURT HUBRICHT, Leipzig O 30, Mariannenstrasse 22. Sekretario de la Sekcio: KURT KLAPS, Danzig, Karpfenseigen 12

FOR LA BURĜAN LIBERPENSON!

Sen ia ebla dubo, nia sennaciula liberpensula paĝo celas sennaciigi la liberpenson. Tre bone! Sed por proletoj tia postulo ne sufiĉas — almenaŭ ĝi postulas klarigon.

SAT tre bone agis forĵetinte la neŭtralismon el sia movado. Ĝi estas proleta organizo, do, logike, ĝi devas forigi el la cerboj de la proletoj ĉiujn burĝajn ideojn, aŭ pli bone dirite: neniigi ĉe la proletaro ĉiujn ideojn, kiuj ne estas proletecaj. Kaj se oni akceptas tiun bazon por la SAT-laboro ĝenerale, ankaŭ oni devas ĝin akcepti por la SAT-liberpensula sekcio.

Tiam, por ne labori en profunda konfuzo, oni devas sin demandi: Kio estas la liberpenso? Ĉu tiu ideo havas la saman signifon por la burĝaro kiel por la proletaro?

La gvidantoj de la eksfama "Internacia Federacio de la Liberpensuloj", kies sidejo estas en Bruselo, respondas: "Jes, ĉar nia Liberpenso estas super la klasoj kaj partioj".

Ni ne faru ludvortojn aŭ aliajn ŝercojn, tiom ridegindaj ajn ili povus esti! Ne, ni pripensu serioze. Ĉu superklasa filozofio povas liberigi aŭ dormigi la penson de la proletaro? Klopodi por altigi la proletan penson super la klasoj, ĉu tio ne estas efika provo por ĝin neŭtraligi? Ĉu adeptoj de tia filozofio baraktante superklase, kun maskitaj vizaĝoj, seninteresiĝante pri la klasbatalo, ne scias, kiagrade la penso de la proletaro estas subpremata? Ĉu ili ne scias, ke elklasigi nian penson estas ĝin neŭtraligi en ĝia propra sklaveco? Ĉu vere ili ne scias tion?

Oni povus multe pridiskuti tiun demandon... sen iu fundamenta utilo. Pli utile estas ekzemple kapti la plej radikalan principon de tiuj ennubigantoj, kaj ĉerpi el ĝi ĝian proletan signifon, forlasante la neŭtralan, kiel laborist-kaptilon. Tio estas — kiam realiĝas! — la ateismo.

Laboristoj scipovu forĵeti la neverŝajnan dion ĉielan. Per ĝi oni elvojigas la penson de ĉiuj kredantaj je ĝi. Sed la neŭtralaj liberpensuloj forĵetante la ĉielan dion, sin kunigas kun la surteraj dioj de la burĝa demokratio, kiu celas envojigi la penson de l' laboristoj al la labirinto de la burĝa reĝimo!

Estas vere por la burĝaro kaj parte por la proletaro, ke la penso liberiĝas per forĵeto de la religiaj dogmoj, sed la konsciaj laboristoj ne devas forgesi, ke nuntempe la religiaj iluzioj kreskas tre bone dank' al la mizeregoj senesperigaj, neapartigeblaj de la kapitalismo, kaj ili pli bone ankaŭ subtenas ĉi tiun. La burĝaro ne bezonas religiojn por si mem, sed ĝi bezonas ilin por la proletaro.

Jes, la penso liberiĝas per forĵeto de la religiaj kredoj. Tamen, diru al mi, Gek-doj, kiuj ne plu kredas je tiuj absurdoj, ĉu vi sentas vian penson vere libera? Kontraŭe, ĉu vi ne konscias, ke la idearo, ke la tuta pensmaniero, ke la tuta reĝimo burĝa malhelpas la disvolviĝon de viaj naturaj penskapabloj?

La kredo, ke sole la religiaj ideoj malliberigas la penson, estas etburĝa koncepto, kiu siaparte mem malliberigas la vivon kaj konsekvence la penson de la proletaro en la kadroj de la burĝa reĝimo.

Estas necese senŝeligi ĉiujn vortojn, kiujn la burĝaro uzas por elvojigi la liberecajn ideojn de sia sklavaro. Ĉi tie mankas loko por tiom granda laboro. Tamen ni devas iomete klarigi la esencajn bazojn de niaj revoluciemaj kritikoj.

"Liberpenso" jam estas vorte plenplena da multnombraj konfuzoj. Ĉu nia penso povas esti tute libera? Ne, ĉar laŭ la naturaj leĝoj, la penso estas haltigata de ĉiuspecaj malhelpoj, kiujn ĝi ne povas renversi. Aliparte, la homo ne povas ne pensi; ĝia cerbo, vole-nevole, funkcias kaj produktas pensojn, tiel necese, kiel la suno produktas varmon, lumon, elektron ktp. Fine, la penso de ĉiu homo dependas de lia materia medio, kaj la penso de ĉiuj kiuj influas ĉiun, ankaŭ dependas de tiu medio; kaj la cerbo, kiu konsistas antaŭ ĉio el heredaĵo de la praavoj, ankaŭ dependas de la materiaj medioj, en kiuj vivon pasigis tiuj lastaj.

De tio rezultas, ke per ĉiuj homoj la penso ne povas esti tute libera, sed ke ĝi fariĝas libera laŭmezure kiel ĝi scipovas forĵeti la barojn, la barilojn, kiuj emas haltigi ĝin, kaj mallibera laŭmezure kiel tiuj malhelpoj estas pli fortaj ol ĝi.

Ni aldonu, ke entute, malgraŭ multnombraj esceptoj, la homa penso, depost sia ekkomenco, estas fariĝinta pli kaj pli venkkapabla. Nuntempe ĝia kapablo estas tiom forta, ke estas malfacile dubi, ke ĝi estas daŭrigonta la saman disvolviĝon ĝis la formortado de la materiaj kondiĉoj de la homaj vivrimedoj.

La homo estas la plej perfekta kaj la plej perfektiĝema aspekto de la materio — almenaŭ surtere. Sed ĝi ne povas sendependiĝi sin el ĉiuj aliaj aspektoj. Estas erarego konsideri la psikologian faktoron, kiel ĉefan faktoron determinantan, ĉar ĝi mem estas estigita de la materia medio.

Sed kio, kia kaj kiela estas la materia medio?

Dum la epoko, kiu antaŭis la artefaritajn produktrimedojn, estis nur la natura medio, en kiu la homoj baraktis per siaj solaj membroj. —

Post kiam la homoj laboris per artefaritaj iloj, nepre la medio fariĝis pli kaj pli ekonomia laŭ la disvolviĝo de la produktrimedoj.

Oni facile komprenas, ke la natura kaj la artefarita medioj similas en tio, ke ambaŭ estis ŝanĝiĝantaj kaj devigis la homojn luktadi por sin adapti al ili kaj perfektigi la artefaritan.

Tiele la ekonomia (do materia) medio aliigis la homojn, kaj tiuj ĉi la medion, ĉiam preparante novajn reciprokajn ŝanĝojn. Tiu fariĝo daŭras kaj daŭros...

El tiu vidpunkto oni povas pasie sekvi tra la historio la nefiniĝontan estontan fariĝon de la homoj, kaj oni facile komprenas, ke en la nuntempaj socioj la materia medio ne estas la sama por ĉiuj homoj. La burĝa medio, kiu estas riĉa, komforta, neelĉerpiĝema, bonviviga, kompreneble tute taŭgas al la burĝoj, eĉ senreligiuloj, kaj al iliaj kaserolaj likiistoj (? Red.)! Ilia penso ne povas esti revoluciema, kaj ili zorgas, por ke ni akceptu ilian koncepton pri la liberpenso. Ĉu estas miriga, ke ili estas konservemuloj, ke ili sin starigas ne nur kontraŭ la feŭdemulojn, — retroiremajn al la tielnomata "bona pratempo" — sed precipe kontraŭ la "sindikatan despotismon kaj la sovaĝan revolucion proletan"?

Sed la materia medio de la proletoj, malriĉa, laciga, infere senespera, ne taŭgas por tiuj produktantoj de ĉiuj riĉoj, por la senpanuloj, por la t. n. "materialo homa". Ĉu estas miriga, ke tiu medio encerbigas al siaj viktimoj alian koncepton pri la libero?

Por duone klarvidanta proleto senreligia tio sufiĉas por kompreni, ke la liberpenso estas klasproblemo.

Gelaboristoj, kiuj forĵetis la religiojn, aliĝu vian sekcion de la Internacio de la proleta Liberpenso (germanlingve: Internationale Proletarischer Freidenker — IPF). Ĝi estas kiel SAT kaj devas absolute resti organize sen politika tendenco. — Al ĉiu organizo siaj taskoj! — La taskoj de IPF estas starigi kaj disvastigi tra la mondo la proletan filozofion, unuigante ĉiujn proletojn senreligiajn.

Emilo Chapelier (9106), Bruselo.

KUN TIU ĈI NUMERO ESTAS EKSPEDATA "LA LERNANTO"

Esperanto-Servo

N-o 16 — 4-a jaro Gvidanto k kompilanto: O. BÄSSLER, Ebermayer-Str. 8, I, Leipzig C 1 (Germ.) 16. Januaro 1930

EL SOVETIO

Pri tuberkulozo en Sovetio

(Esperanto-Servo.) Laŭ komunikoj de la popolkomisario por higieno, la nombro de malsanuloj en la urboj de Sovetio plimalgrandiĝis, kompare la antaŭmilitan tempon. En Petrograd (nun Leningrad) en jaroj 1904—08 mortis dum ĉiu jaro 98,2 po 1000 da loĝantoj, dume en jaro 1927 mortis nur 24,1 po 1000 da loĝantoj. En Moskvo mortis en jaro 1900 po 1000 da loĝantoj 34,5; en jaro 1927 nur 15,8 personoj. En Leningrad la nombro de mortoj estas pli malalta ol en Paris, en Moskvo pli malalta ol en Vieno k Praha. *Bondarevski, Sartana.*

EL GERMANIO

Epidemio ĉe rusaj elmigrintoj

(Esperanto-Servo.) Laŭ sciigoj el la rusaj barakoj en Hammerstein, okazis inter la infanoj de elmigrintoj-kulakoj tre danĝera morbil-epidemio. En unuaj tagoj de januaro oni jam raportas pri 57 mortintaj infanoj, dume ĉ. 35 infanoj ankoraŭ kuŝas en litoj grave malsanaj. La granda kriego de la germana registaro por "helpo al germanaj suferantoj en Sovetio" estas plej klare malkovrita per tiu epidemio. La malsanon kaŭzis unuavice la malbonaj higienaj kondiĉoj en la barakoj de l' enmigrintoj, aliflanke ankaŭ la malbona nutrado. Oni ja vokis por kuracista helpo, sed multaj familioj, kiuj apartenas al sekto de menonitoj, protestis k kontraŭstaris. Per preĝado la reakciaj kulakoj provas savi la infanojn de morto. Cetere inter multaj familioj malaperas la espero pri pli bona vivebleco ol en la socialista Sovetio. Sole la germanaj bienposedantoj havas "grandan koron" k favore dungas kulakojn, ti-kiuj kontraŭbatalis la socialistan konstruadon en Sovetio. Sed ankaŭ tiuj jam ne plu estas kontentaj, ĉar la salajro estas treege malalta k labortempo sufiĉe longa. *7182, Chemnitz.*

Faŝistoj ĝenas teatro-prezentadon

(Esperanto-Servo.) En lasta semajno de decembro ludis en nia urbo Vorms grupo de aktoroj, sub gvido de la revolucia reĝisoro Piskator (el Berlin). Oni prezentis "§ 218 — turmentataj homoj". Per tiu prezentado la aktoroj montris la kruelan anim-turmentadon, kiun kaŭzas tiu paragrafo 218 al gravedaj knabinoj k virinoj (§ 218 malpermesas k severe pun-ebligas abortigon, eĉ por 10-jaraj knabinoj sekse perfortigitaj). Dum la prezentado estis trankvilo ĝis la tria parto, kiam faŝistoj subite ekvokis: fi, fi, juda friponaro k. s. Sed la plejmulto de ĉeestintoj entuziasme aplaŭdis la klerigan prezentadon. Post finiĝo la faŝistoj minacis al la vizitintoj per revolveroj k gumbastonoj. Policistoj arestis kvar personojn. *14 891, Vorms.*

EL URUGVAJO

La prostitucio en Montevideo

(Esperanto-Servo.) En Montevideo estas kelkcentoj da virinoj, kiuj estas oficiale kontrolataj kiel prostituinoj; sed pli multaj estas ti-kiuj ne estas kontrolataj. La strato Serbal estas la ĉefa loko de tiuj virinoj; en tiu strato ne ekzistas aliaj loĝantoj ol prostituinoj, k laŭ leĝo nur du virinoj povas loĝi en unu domo. Ili devas lui la tutan domon; la domoj preskaŭ ĉiuj apartenas al bankoj. La luado okazas jene: la virinoj pagas garanti-sumon de 300—500 pesoj por la luado, k ĉiun tagon ili devas pagi 20 p. por la tuta domo. La virinoj (la plej malmultaj) akiras dum unu tago 40—60 p. — sed ili laŭ leĝo nur dum nokto povas loĝi en tiu domo, dumtage ili devas lui alian loĝejon en alia parto de la urbo. Ili devas dungi pordistinon (maljunan virinon), kiu ricevas po nokto 3 p., plue ili devas teni reordigiston (po tago 2—3 p.). Plej interese estas, ke laŭ leĝo ili devas teni la pordon ĉiam fermite, k se la polico vidas la pordon malfermita, tuj okazas punigo. Sed kontraŭleĝe la virinoj ne nur tenas malfermite la pordon, ili eĉ tutnude montras sin al la vir-amaso, kiu plenigas la straton. Nature, ke la policistoj dum ĉiu tago ricevas silentpagon — 5—10 p. po domo. — Finfine tamen por la prostituinoj restas nur mizerego k la hospitalo. La bankoj, konante ilian situacion, ne repagas la garantisumon ĝis kiam finiĝas la malsano. Ili scias, ke la malsanaj virinoj ne plu povas pagi al ili la tagan kotizon por la domo. Plue, proksime de strato Serbal estas teatro, kie la ŝtato edukas prostituadon. En tiu teatro por malalta prezo la junuloj povas vidi nud-aktorinojn, ludante k dancante. Kaj estas en tiu ĉi ĉirkaŭaĵo multaj aparatoj, en kiuj por du centisimoj tra vitraĵo oni vidas plej diversajn prostituajn fotografaĵojn. La plej multaj prostituinoj estas enmigrantinoj; 80% el enmigrantinoj forlasas siajn edzon, fraton k infanojn k post kelka tempo troviĝas surstrate. 60% de la viroj ankaŭ ĉarlataniĝas, ludante je ruleto, kiu estas ankaŭ ŝtata aparato en la parko Rodo. Multaj laboristoj laboras malfacilan laboron dumsem ajne, por forludi tutan semajn-akiraĵon dum dimanĉo. Tiuj personoj eĉ ne volas aŭdi ion pri la laborista movado. *13 827, Montevideo.*

EL ITALIO

Kontraŭ la faŝista reĝimo

(Esperanto-Servo.) Italaj laboristoj k kamparanoj vivas nun sub plej malbonaj kondiĉoj. Ribeletoj eksplodas en kamparo, sed la kamparanoj, armitaj nur per simplaj ĉas-pafiloj, devas forkuri post kelktempa pafado. En urboj policanoj k nigro-ĉemizuloj arestadas. La senlaboruloj demonstracias, fi-kantante faŝistajn himnojn k laŭdojn al la "duce"; ĉiuj havas siajn poŝojn elturnitaj, por montri ke eĉ centimojn ili ne havas. Multaj fabrikoj laboras nur dum tri tagoj po semajno, la kamparanoj ne povas eksporti kiel kutime, ĉar leĝo komplikas k malhelpas multe. Dumnokte oni gluis sur murojn jenajn afiŝojn: *dum epoko falĉil-martela, ni manĝis koketon tre bela — sub reganta "kaposenhara", eĉ terpometo estas tro kara.* Je palacon, lasttempe aĉetita de aviadministro, oni gluis: propraĵo de aviadministro "donu flugilojn al la patrio" (agitvortoj de t. n. "libervola mondonaco"). *Italano.*

EL HISPANIO

Ĉu finas la hispana diktatoreco?

(Esperanto-Servo.) Laŭ onidiro la hispana diktatoraro laciĝis. Ĉi tiu onidiro ne venas nur de la popolo, sed ankaŭ de la diktator-ĉefo mem. Jen kion diris Primo de Rivera: "la diktatoreco ne estas taŭge uzebla". Tiujn ĉi vortojn li uzis dum parolado. En enketo, kiun publikigis la revuo "Estampa", kiam kelkaj hispanaj famuloj esprimis opiniojn pri la jaro 1929, diris Primo de Rivera: "Min ne kontentigas la jaro 1929, tute ne. Ĝi estis jaro malfacila k malfeliĉega ... Jaro malsimpatia, ke la demonoj ĝin forportu." "La jaro 1930, mi petas, ne estu simila al la pasinta; ĝi pasu facile k feliĉe por la lando ... Dio ĝin prenu sub siaj protekto k beno." (Ho, kiel "homecaj" ŝajnas esti la t. n. diktatoroj!). Sed el liaj eldiroj "oni" divenas nepran regad-ŝanĝon en "nia" lando ... *1050, Madrid.*

Raportojn por ĉi paĝo sendu senpere al Leipzig!

16-a listo de raportoj en jaro 1929/30

103. Pri tuberkulozo en Sovetio. Bondarevski, Sartana (Sovetio).
104. Epidemio ĉe rusaj elmigrintoj. 7182, Chemnitz (Germanio).
105. Faŝistoj ĝenas teatro-prezentadon. 14891, Vorms (Germanio).
106. La prostitucio en Montevideo. 13827, Montevideo (Urugvajo).
107. Kontraŭ la faŝista reĝimo. Italano (Italio).
108. Ĉu finas la hispana diktatoreco? 1050, Madrid (Hispanio).

TRA ESPERANTIO

NOVA ATINGAĴO DE ESPERANTO EN SOVETIO

Por la jaro 1930 Ŝtata Eldonejo (Gosizdat) de RSFSR aperigis universalan sovetan ilustritan kalendaron kun forŝireblaj folioj por ĉiu tago. En tiu kalendaro nomoj de monatoj k tagoj de semajno estas presitaj en ses ŝtataj oficialaj lingvoj de USSR — rusa, blankrusa, ukraina, armena, kartvela, turka (laŭ nova latinigita alfabeto) k en internacia lingvo esp-o.

En 1929 tiuj nomoj en kalendaro estis presitaj nur en 3 lingvoj: rusa-ukraina k blankrusa. La tuta alia teksto en kalendaro estas presita en rusa lingvo. Tio estas farita, por ke ĉiu legopova civitano de USSR povu tralegi la kalendarojn de Ŝtata Eldonejo. Pri tia aranĝo estas notita en komenco de kalendaro, en ĝia enhavtabelo, enkonduka noto "Por atento de legantoj" k ankaŭ en la fino de kalendaro sur unu el kalendarfolioj (24. XII.) en noto pri specoj de ĉe "GIZ" eldonataj kalendaroj. Krom tio sur folio de 3. VI. estas presita propaganda priesp-a noto "Lingvo de laboristoj-sportuloj", kiun mi ĉi tie en traduko el ruslingvo prezentas al vi: "Kelkaj dekoj da laboristaj sportuloj, partoprenintoj de Tutunia Spartakiado, sin turnis al junularo pere de ĵurnalo "Komsomolskaja Pravda" (Junkomunista Vero)-Moskvo kun letero, en kiu ili deklaris: "Al spartakiado venis kelkcent laboristaj sportuloj el multaj landoj, parolantaj nur en unu sia nacia gepatra lingvo. escepte eble unuopaj, per feliĉa hazardo scipovantaj ian fremdan lingvon. Kaj ni observas tiun bildon: naciaj grupoj de alvenintaj laboristoj, ne sciantaj ian alian lingvon krom gepatra, tenas sin apartigite; en plej bona okazo ili havas iomajn interparolojn helpe de interpretistoj.

"Ĉu estas necese paroli pri rezultoj de tiuj interparoloj k renkontoj, tiom ne sufiĉaj por plena internacia unueco, kompare kun tio, kion ni povus delonge jam organizi?! Ĉi tie oni devas utiligi unuecan internacian lingvon, feliĉe jam ekzistantan — esp-o. Inter partoprenantoj de spartakiado estas kelkaj dekoj da K-doj, scipovantaj esp-on, el 7 landoj (Germanio, Aŭstrio, Svisio k. a.). Kun helpo de esp-o ili treege estas kunligitaj ne nur unu kun la alia, sed ankaŭ k kun sovetaj esp-istoj. Ili interrilatas unu kun la alia libere, sen interpretistoj, interŝanĝante pensojn k opiniojn. Ĉu estas necese paroli pri utilo de tia lingvo por laborista movado, por internacia edukado k unuigo de amasoj? Kiel necesan fakton, ni notas, ke kelkajn K-dojn oni sendis al spartakiado, nur tial, ĉar ili scipovas esp-on, per kies helpo ili pri USSR k pri aliaj landoj, reprezentitaj en spartakiado, ekkonos certe pli multe, ol aliaj K-doj ne scipovantaj tiun lingvon. Ĉu ne venis tempo por KIM (Junulara Komunista Internacio), VLKSM (Tutunia Komunista Junularligo) k soveta junularo solvi demandon pri enkonduko de esp-o en sia vivo, demandon pri utiligo de esp-o por celoj de internacia kunligo k edukado de junularo? Via voĉo k decido estus pli aŭtoritata, ol samaj decidoj de apartaj socialdemokrataj partioj."

Konsiderante eldonkvanton de ĉi tiu kalendaro — 2 000 000 da ekzempleroj, ni povas vidi, kian grandegan propagandan efikon havas ĉi tiu kalendaro ĉe Sovetia publiko.

Mi proponas al ĉiuj Gek-doj, sendi gratulleterojn, dankante k instigante la Redakcion de kalendaroj por plua k pli granda utiligo de esp-o en siaj kalendaroj. Skribu laŭ adreso: USSR, *Moskvo,* Roĵdestvenka, 4, Gosizdat RSFSR. V Redakciju kalendarej.

Vjaĉeslav V. Kalaŝnikov (1125), Niĵnij-Novgorod.

Nova ekzemplo de oferemo por la 12-paĝa 'S-ulo'!

"Ĉiam antaŭen devas esti nia devizo," skribas la Lab. Esp. Grupo "Nia Espero" en Tourcoing (Nord-Francio), "ni ne devas permesi, ke "S-ulo" malantaŭeniru. Estas pro tio ke nia malgranda grupo sendas al vi modestan sumon de 50 frk. alvokante ĉiujn grupojn el la mondo por imiti nin. Gek-doj, estu

VERAJ AKTIVAJ SAT-ANOJ! ĈIAM ANTAŬEN!"

La taskoj de infansekcio

Se nia infansekcio sukcesos kontentige solvi la korespond-problemon inter infanoj diverslandaj, ĝi faros tre utilan edukan laboron — en tio la sekcigvidanto miaopinie iras tute ĝustan vojon. Pri la maniero de l' korespondado mi ja iom povas kompreni la timojn de nia K-do N. esprimitajn en la tri frazoj cititaj el lia letero (n-o 274). Malofte infankorespondado estas nefalsita de plenaĝulaj manoj, celdirektita en agita senco. Infano estas vakso en la manoj de l' plenaĝuloj, sub kies influo ili staras. Ĉiu homo, ankaŭ la plenaĝa, la raciema, vivas per iluzioj, se li ne estas kvazaŭbesta produktmaŝino mekanike laboranta por havigi al si la krudajn rimedojn por trinki k manĝi. Ni konfesu, ke tio, kio donas al ni forton por agi, pasiiĝi, ĝoji, akceli ideojn, estas la *iluzioj,* kiujn ni nutras k dorlotas. Kaj la infano multe pli inklinas al iluzioj ol la plenaĝulo, ĉar mankas al li vivospertoj maldolĉaj k la rapida disvolviĝo de l' juna organismo rezultigas ĉe ĝi pli abundan elfluon da vivkapablo, da optimismo. Ĝi kaptas ĉiun imagaĵon, kvazaŭ ĝi ja estus realo aŭ almenaŭ — realigeblo. En "Diablidoj" mi montris en lasta ĉapitro knabon en iluzioj revantan ... en iluzioj kreitaj *konscie* en lia cerbo de plenaĝuloj. La senlima konfido, kiun havas infanoj al plenaĝuloj, fariĝas en ilia koro dogma kredo al transdonitaj, volonte akceptataj "veroj". Ŝajnas al mi, ke per sia letero K-do N. celis ŝirmi sian infanon kontraŭ tiaj kredoj. Ke memstara korespondado de infanoj povus esti danĝera, ja ŝajnas al mi erare. Male, mi vidas danĝeron en tio, ke gepatroj aŭ aliaj plenaĝuloj-edukistoj tro multon diktas al la infanoj en ilia korespondado!

Mi povas bone imagi infanon, lernanta esp-on, kiu per la geografilecionoj en la lernejo ekinteresiĝas pri translimaj samaĝuloj k esprimas deziron interligiĝi koresponde kun ili. Tio estas tre natura infan-deziro en nia epoko tendencanta al sennaciiĝo. Prudentaj gepatroj ebligos al siaj infanoj praktiki la transliman korespondadon kun samaĝuletoj, eluzi siajn esp. sciojn, k ... ili ne enmiksiĝos, escepte rilate al korekta lingvo-uzo, sed *ne* rilate al la temoj. La infanoj interŝanĝos siajn impresojn, siajn etajn travivaĵojn mem tiel, kiel plaĉos reciproke al ili. Same kiel gepatroj k edukistoj ne kutimas ĝeni la ludojn de l' etuloj, estus eraro ĝeni ilian korespondadon libere komencitan. Se infanoj nature ĉesos interkorespondi, tiam la kaŭzoj ne estas manko de enmiksiĝo gepatra, sed simple malsama medio kreinta malsamajn "kredojn": tio ne ofte okazos, se oni lasos plenan tem- k korespondliberon al la geknaboj. La rezultoj estos nepre fruktodonaj; kreiĝos speco da eksternacia solidaro inter la infanoj k ili faros ĉion eblan por kulturi la kreitan amikecon.

Kaj la eduko al klaskonscio? Se prolet-infanoj interŝanĝas siajn spertojn, gajajn k malgajajn, la klasproblemo reflektiĝas en plej diversaj formoj — ĉi speguliĝas en rimarkoj pri loĝado, manĝado, vestado, pri ekskursetoj, konduto de lernej-kamaradoj, pri eksterordinaraj okazoj, festoj ktp. Ne bezonas stari iu malantaŭ la infano por korekti aŭ pli precize formuli la infanan klas-instinkton. Mi estas konvinkita, ke K-do N. en tia sincera infan-korespondado (sen enmiksiĝo de plenaĝuloj) ne povas trovi ian danĝeron. Ni ebligu per la Sekcio tian korespondadon. *N. Bartelmes.*

PRI SKRIBADO DE PROPRAJ NOMOJ

La ĉefa principo de esp-o estas la internacieco. Ĝi estas tre bona internacia ilo, k "S-ulo", laŭ mia opinio, tre bone plenumas sian taskon kiel ligilo. Plej grandan valoron havas la fakto, ke la artikoloj pri div. landoj estas skribitaj ĉiam de personoj tie mem loĝantaj.

Nur unu reformon mi dezirus: Ĉiu artikolo enhavas personajn k geografiajn nomojn. Pri nomo oni bezonas scii du ecojn, nome: la ortografion k la elparolon. Oni deziras scii, kiel skribi k kiel elparoli la nomon. La ĝisnuna kutimo de "S-ulo" ne ŝajnas al mi kontentiga. Mi citos ekzemplon· La francan aŭtoron Voltaire oni en nia jurnalo skribas "Volter". Ne konante la nomon k ne sciante la francan lingvon, neniu esp-isto povas scii, ke la elparolo estas "Voltēr" kun akcento sur la lasta silabo. Kaj franca leganto, ne konante la kutimon de nia ĵurnalo, eble tute ne malkovros, ke la artikolo traktas pri Voltaire. Eble li kredus, ke oni skribas pri nekonata k nefranca aŭtoro Vōlter.

Mi proponas, ke oni ĉiam skribu la nomojn kun la nacia ortografio k en krampoj la elparolon esp-e, sed ĉiam kun streko super la akcento: Do: Voltaire (Voltēr). La redakcio devas postuli ĉi tion de la aŭtoroj de la artikoloj k ne mem decidi pri la elparolo. Ĉar nur la enlandaj aŭtoroj povas scii precize la ĝustan elparolon. Nur kiam la nomo devenas de lingvo kun aliaj literoj, oni uzu nur esp formon, sed ĉiam kun superstrekit akcento. Ekzemple la nomo de famekonata rusa politikisto Ĉiĉērin. La esp. literoj tre bone esprimas la elparolon, sed nur, kiam la akcento estas indikita.

La ĝisnuna kutimo en "S-ulo" tute ne estas sekvata konsekvence, ĉar tio verŝajne tute ne estas ebla. Ekzemple en la resumoj el "Standards" mi legas "Detroit" sen ia provo klarigi la elparolon (Detrōjt) kaj en la sama artikolo "Dübreŭj". Mi devas konfesi, ke mi ne scias, ĉu tio estas la nacia (k kianacia) ortografio aŭ eble eksperimento de esp. elparolo. Laŭ mia propono oni ĉiam donu ambaŭ: ortografion k esp. elparolon.

J. H. Leŭnbach (Lōjnbak), SAT-ano 15 076.

RED. RIMARKO: Kiam ni ne esp-igis la proprajn nomojn, la legantoj el la landoj, kie ne ekzistas latina alfabeto, bombardis nin per riproĉoj. Se oni esp-igas Ĉiĉerin, franca leganto, kiu kutimas legi tiun nomon skribita "Tchitschérine" ankaŭ povus ne scii, pri kiu homo temas. Sed estas dube, ĉu franclingvano ne rekonas la nomon de "Voltaire" en "Volter". Ni opinias, ke historiaj nomoj mondkonataj povas sen ia domaĝo esti esp-igataj. Kaj Volter kiel Ŝekspir aŭ Lajbnic estas tiaj. Cetere en la traduko de K a n d i d la franca ortografio estas unufoje enkrampe montrita, same kiel en la artikolserio "Standards" en la enkonduko (n-o 267) la nomo de Dübreŭj en franca ortografio "Dubreŭil".

En la redaktejo estas reprezentantoj de tri lingvoj: angla, franca, germana. Por la nomoj el tiuj ni do povas meti la proksimuman fonetikan formon de la nomoj k ĉiam aldonas unufoje en la koncerna artikolo la nacian ortografion. Rilate la aliajn lingvojn ni povas tion fari nur, se la verkintoj mem aldonis la fonetikan formon. La problemo estas ne simpla k ne baldaŭ finsolvata. Sed ni iras laŭ la vojo montrita de Zamenhof (vidu en "S-ulo" n-o 270, pĝ. 118). Tre helpos en la solvo de tiu problemo, se jam nun la SAT-anoj esp-igus sian nomon.

● AVERTO! Lastatempe la Redaktejo estas bombardita per leteroj ne sufiĉe afrankitaj. Por ricevi ilin, ni devus pagi punafrankon sufiĉe altan. La deficita buĝeto de 'S-ulo" tion ne permesas; tial ni devis rifuzi la leterojn.

"Socialisma konkurado" ĉe esp-istoj

Konsiderante, ke *per*esp-a laboro estas plej efika *por*esp-a varbado, mi akceptas alvokon de K-do Tilin-Leningrad por "socialisma konkurado" ("S-ulo" n-o 274) sur bazo de peresp-a interligo de neesp-istaj laborist-kolektivoj. Mi surprenas la taskon, komune kun aliaj Gek-doj de Leipzig, ĝis 1. IV. 1930 nove interligi 10 pli grandajn laboristkolektivojn (en fabrikoj, organizoj) de Leipzig k ĉirkaŭaĵo kun laboristkolektivoj en Sovetio.

Sovetiaj Gek-doj estonte ne plu havu okazon, plendi pri malhelpoj por disvastigo de esp-o en Sovetio, ĉar mankas interligoj peresp-aj kun aliaj landoj. Pro tio mi alvokas jenajn Gek-dojn, sur bazo de mi akceptita partopreni la "socialisman konkuradon": *Argentino:* Barrot, Buenos Aires; *Germanio:* Buchholz, Essen; *Rumanio:* Arad-ano; *Nederlando:* Roosing, Zeist; *Urugvajo:* nove fondita lab. esp-ista grupo, Montevideo. Templimon la alvokitaj Gek-doj mem fiksu, same sian taskon. Mi do atendas vian eĥon en "S-ulo".

Pri rezultoj de la laboro la alvokitaj Gek-doj post pasigo de la templimo koncize raportu al K-do Tilin-Leningrad, kiu verku kolektivan raporton por "S-ulo".

O. Bässler (715), Leipzig.

ATENTIGO DE LA REDAKCIO

Neuzatajn manuskriptojn ni ne resendas. Se resendo estas dezirata, oni avertu nin speciale k pagu la resendafrankon. Prefere tenu kopion de la manuskriptoj ĉe vi!

Rezultoj de l' internacia interligo peresperanta

El 40 landoj SAT-anaro sendis al fervojistaro de Samara-Zlatousta fervojo priskribojn de sialanda proleta vivo k batalo, ankaŭ salutleterojn por ĉiu revolucia festo. Ne vana estis tiu laboro! Esp.-oficejo de la fervojo en Samaro vaste utiligis la leterojn en amaskunvenoj, manifestacioj, gazetoj tra la 4000-kilometra fervoja reto. Okazinta kulturlaboranta konferenco ĉe la fervojo akceptis tre favoran rezolucion, laŭ kiu ĉiuj distriktaj profunuiĝaj fervoj. komitatoj, ĉiuj kulturkomisionoj lokaj, klub-administrantaroj garantiu akcelon al esp. rondetoj utiligante ilin por interligo internacia. Distriktaj komitatoj organizu esp. oficejojn, celadu organizadon de perleteraj kursoj, instigu al lernado junularon, virinojn k laboristojn. Bibliotekoj havigu lernolibrojn, literaturon pri esp. movado. Redakcioj rilatu kun esp. oficejoj pri kolektiva korespondado. — Por efektivigi tiun ĉi rezolucion, K-doj, daŭrigu la komencitan korespondadon kun ni! De februaro ĝis aprilo krome okazos distriktaj ferv. kongresoj, kie ni provos diskutigi la esp. aferon. Por tio ni bezonas vian helpon per abundaj salutleteroj. *(Atentu la koncernan anoncon en venonta n-o!).*

B. Ĵeleznjakov (5583).

RADIOPROGRAMOJ EN "S-ULO"

Nuntempe en ĉiuj grandaj ĵurnaloj aperas radioprogramoj. Sed preskaŭ ĉiuj (almenaŭ ĉe ni) tute ignoras la disaŭdigojn en esp-o. Ĉu ne en tio estas tasko por "S-ulo"? Mi ne postulas novan Paĝon, ĉar jam estas sufiĉe da ili. Mi nur deziras malgrandan resumon pri la esp. disaŭdigoj, k mi kredas, ke tio estas en la intereso de ĉiuj lab. esp-istoj, ĉar per la aŭskultado ni ja povas lerni multon. Praktike la afero estas tre facile aranĝebla, ĉar la Internacia Radio-Asocio semajne dissendas programojn en esp-o. Tiujn ni ja povus presigi en "S-ulo".

H. Nielsen (11 082).

Red. noto: Se ni havus la konvinkon, ke granda nombro da legantoj dezirus foruzon de spaco en "S-ulo" por tiaj programoj, k se ni ne estus devigataj malampleksigi la gazeton pro tio, ke ni ne atingis ĝis nun la nepre necesajn 4000 abonantojn, ni volonte konsiderus supran proponon . . .

RECENZEJO

Klasigita Terminaro de Esperanto. Kompilita de Eĉeno S. Cian. Eld. Ŝanĥaja Esp. Asocio. P. O. Box 1332, *Ŝanĥajo.* Prezo: S 0.20. 32 pĝ. Form. 12×19 cm. — Helpilo por ĉinlingvanoj.

Biblioteko Nova Kulturo: La fortoj en la viva naturo. P. Danov. Volumeto 9/10. 56 pĝ. Form. 12×19 cm. Eld. "Nova Kulturo", *Burgas* (Bulg.). Eldonaĵo de homama sekto.

NIA POŜTO

1305. — La kolektivan laboron por "L. L." ni utiligos.

13 503. — Uzo de via manuskripto dependas de la loko disponebla.

14 157. — Ni decidis uzi vian artik. pri klasbatalo; la novan manuskr. ni transsendis al red. de liberpens. pĝ.
Red.

10 008. — Ni ne pagas honorarion al kunlaborantoj; la gvidanto k redaktoro eĉ pagas sian abonon. Pri la eldono de verkoj, vi unue sendu la manuskripton al nia Literatura Komisiono (Odeso) k kolektu monon, kiun vi pruntedonos al la Eldonkooperativo; se vi ne povas kolekti monon, la verko devas atendi sian vicon.

10 596. — Tian materialon vi devus sendi al adreso de l' Servo en Leipzig.
Red.

K·O·R·E·S·P·O·N·D·A·D·O

Unu enpreso: Simpla trilinia anonco kostas 0,80 mk. g., ĉiu plia linio 0,50 mk. Ni nur akceptas anoncojn kun samtempa pago. L = letero, PK = poŝtkarto, PI = poŝtkartoj ilustritaj, PM = poŝtmarkoj, bfl. = poŝtmarko sur bildflanko, kĉl. = kun ĉiuj landoj, esp-aĵo = esperantaĵo.
Ĉiuj petantoj pri korespondado havas la devon, nepre respondi almenaŭ unu fojon al ĉiuj petoj koncernantaj la fakon, por kiu ili sin enskribigis.

AŬSTRIO

K-do Anton Brutar, Waidhofner Str. 80, *Amstetten,* kĉl, L, PK, PI, PM, bfl. Resp. garantiata.

BRITIO

K-dino White, 212 Belsize Road, *London, N. W. 6,* kĉl, pri radio, interŝ. radiogazetojn.

ĈEĤOSLOVAKIO

K-do Gustav Eiselt, Bartelberg 13, *Gablonz a. N.* (sportulo, naturamiko), interŝ. fotojn, L, PI, kĉl. Resp. garantiata.

GERMANIO

K-do A. Heinecke, Gosenstr. 38, *Halle/Saale,* kĉl, PI.

K-do Alfred Schmiedel, *Obergrünberg,* Post Schmölln/Th., kĉl, PI, bfl, il. gaz. Resp. garantiata.

K-do Walter Blandinski, Hubenstr. 91, *Breslau,* kĉl, pri ĉ. temoj. Resp. garantiata.

K-do H. Hahn, *Salzburghofen 64 b. Freilassing,* Bavario, kĉl, krom Sovetio, PI, bfl.

HISPANIO

K-do Ramón Moret, Sardañola 22-b, *Barcelono* (Sans), kĉl, PI.

K-dino Rosita Forment, Vellarroel 183, 2°, *Barcelono,* kĉl, krom Sovetio, PI. Resp. *ne* garantiata.

K-do Simeon Martinez, Moncayo 43, *Valencia,* kun Gek-doj en Francio, L, PI, gaz. ktp. Certe resp.

K-do Julian Aguilar, Guillem de Castro 38, *Valencia,* kĉl, sed nepre nur pri simplaj nepolitikaj temoj. Certe resp.

JARABONO
por membroj . . . 8 mk. g.
por nemembroj . . 9 mk. g.
Ankaŭ ¼-jare abonebla!

SOVETIO

— J. lernantoj koresp. kun lernejaj lernantoj ĉl, pri div. temoj. Adr.: Ĵeleznodroĵnaja ŝkola 7, letki, *Rtiŝĉevo,* N. Volĵskogo Kraj, Balaŝovskogo okr.

K-do Gr. Kac, Kloĉkovska 10, kv. 7, *Ĥarkov,* kĉl, pri vivo k laboro de junularo, tekniko, ateista mov. k similaj temoj.

K-do L. Karasj, Stoljarn. per. 7, kv. 1, *Ĥarkov,* kĉl, pri vivo de junularo.

K-dino Z. Kadaŝeviĉ, Botaniĉeska 4, kv. 1, *Ĥarkov,* kĉl, pri ĉ. temoj, L, PI.

K-do Nemcev, Sverdlovstr. 31, kv. 30/a, kom. 3, *Ĥarkov* (ruĝarmeano), dez. koresp. kĉl, precipe kun ruĝaj soldatoj.

— Esp. rondeto de fabriklernantaro, fabriko "Tinjakov", *Ĥarkov,* F. Z. U., kĉl, pri jun., lab. movado, lab. kondiĉoj, fabrik-lernado, industria klerigo, tekniko, kulturo, literaturo, kino, arto ktp. L, PK, PI, gaz. il.

K-do B. Słobodĉikov (21 j. laboristo), Spartakovskaja ul. 18, kv. 3, *Moskvo — 66,* kĉl, PI, bfl, PM, il. gaz. Resp. garantiata.

K-do Mikaelo Tarasov (radio-amatoro), Volĥovstroj, 6 elektra stacio, *Leningrad,* kĉl. Resp. garantiata.

K-do S. Buzin, 8 Sovetskaja 57, *Leningrad,* kĉl, pri ĉ. temoj.

K-do A. Lebedev, pr. 25 Okt. 158, kv. 2, *Leningrad,* kĉl, pri div. temoj. Resp. garantiata.

— Rondeto esperanta ĉe kolektivo VLKSM de fabriko "Elektro-Energio" koresp. kĉl, pri politikaj k sociaj temoj. Adr.: *Leningrad, 24,* pr. 25 Okt. 158, kv. 2 al K-do A. Lebedev.

K-do V. Cigankov, Pokrovka, 27 kv. 61, *Moskvo,* kĉl, L, PI.

K-do N. Ĉistjakov, Starosadskij per. 9, kv. 4, *Moskvo,* kĉl, L, PI, PK, PM, il. gaz. Resp. garantiata.

K-do V. Sobolev, *Siĉevka,* Smolen. obl. 29 Artil. parkov ŝkola, kĉl.

— Junkomunistoj koresp. kĉl, pri ĉ. temoj. Certe resp. — Adr.: *Eisk,* Gogola 155 al K-do A. Nesterenko.

— Kiu dez. ric., vidaĵon kun Turkmenaj tipoj? Sendu ekspoziciaĵojn aŭ rev. foliojn por C. Turkmena Muzeo de Revolucio. Adr.: A. Jadlovker, Stavropolskaja 22, *Aŝĥabad.*

Florkulturistoj!
Mi serĉas helpanton en Germanio aŭ Svisio, kiu estas preta por mi meti anoncon en ia ĝardenkultura gazeto. Mi serĉas laboron en via lando. Mi pagos la anoncon antaŭe. Skribu al K-do Henk Spaner, Dahliastraat 4, *Aalsmeer* (Holando).

Seriozan koresp. serĉas 15 progresintoj!
Inter ili karbministoj, lab. sportuloj, biciklistoj, liberpensuloj, junuloj kaj *3 gelernantoj 12—15-jaraj.* Respondon garantias K-do Max Lühmann (7951), **Hückelhoven, Krs Erkelenz, Loerbroks-Str. 1**
(Germanio)

Peter S. Epifanovich
Box 47, Int. House, 500 Riverside Drive, *New York,* dez. koresp. pri seksaj demandoj, prostituo ktp., interŝanĝi aŭ aĉeti seksfotojn k bildojn. Koresp. esp., angle, france, ruse, germ.

SKRIBU EN NOTLIBRO:
Moskva Komitato de SEU
funkcias ĉiutage de la 6-a ĝis 9-a h. vespere (Moskvo, Spiridonovska, 15)
Ĉiuj venontaj Moskvon estas invitataj.
Poŝta adreso de MK SEU estas:
Moskvo, poŝt-kesto n-o 894
Adresojn de junkomunistaj, ateistaj k IRH-organizoj ni volonte publikigas senpage en Sovetaj esperanto-gazetoj.

K-do Semenov F.
Bol. Vatin per. 8, kv. 8, *Moskvo 4* (Sovetio), deziras korespondadi kun ĉiuj landoj pri ĉiuj temoj L, PK, PI, interŝanĝi per gazetoj k esperantaĵoj.

LAB. ESPERANTO-ASOCIO
por la germanlingvaj regionoj
Distrikto Akvobordo
1. Por kompletigi kaj renovigi nian migrantan ekspozicion ni petas transsendon de materialo kiel il. PK, gazetoj, gvidlibroj, flugfolioj kaj alia taŭga materialo.
2. Por interesi ĉi tieajn instruistojn pri esperanto ni petas transsendon de taŭga lerneja materialo rilatanta al esperanto.
Ĉiuj sendaĵoj estos rekompencataj. Adreso: *Lab. Esperanto-Asocio, Distr. Akvobordo* (Hermann Theobald), *Hamburg-Altona, Im Hag 5.*

Grupo de Esp-istoj
dez. koresp. k. ĉ. l. pri ĉio — let., PI, interŝanĝi gazetojn. Je ĉiu demando tuja respondo. Adreso: *Krasnodar* (Sovetio), Klubo Ĵeldor, grupo Esp-o.

ENHAVO:

	pago
Kulturo en Sudameriko	181—182
Januaraj memordatoj	182
El "Ŝtato kaj Revolucio" de Lenin . .	182
El "Junius"-broŝuro	182—183
Pri Kristnasko	183
Sennaciula Liberpensula Paĝo	184
Esperanto-Servo	185
Tra Esperantio	186—188
Korespondado, Anoncoj	188

Presejo: Peuvag, Druckerei-Filiale Leipzig (Germanio)